KOTIZOJ:	**1-a periodo**	**2-a periodo**
	ĝis la 30-a de marto 2011	**post la 30-a de marto 2011**
	100,00 kunaoj	120,00 kunaoj

La kotizo ne estas repagebla!
La kotizo ne inkuzivas loĝadon kaj manĝadon. La kotizo inkluzivas neniun asekuron.

LOĜADO:

LKK organizos loĝadon je kelkaj manieroj:

1. **Loĝado en Zagrebo** - en la Hostelo "Arena". Loĝado en unulita ĉambro kostas 202,00 kn, en dulita ĉambro 172,00 kn kaj en trilita ĉambro 147,00 kn. Ĉiuj prezoj validas por unu persono kaj por unu nokto. En la prezo estas inkluzivita matenmanĝo kaj turisma imposto.

2. **Loĝado en Bjelovar** - en la 3-stela hotelo "Central" aŭ en privataj apartamentoj. La prezoj estos konataj post traktado kun la hotelo kaj privatuloj.

3. Por eventualaj interesiĝantoj el orientaj partoj de la lando, ekzistas ebleco organizi loĝadon ankaŭ en **Đurđevac** (Ĉasista domo Peski - popersona tranokto kun matenmanĝo kaj turisma imposto proksimume 200,00 kunaoj). La kongresanoj loĝantaj en Đurđevac estos senpage transportitaj al Bjelovar la 4-an de junio kaj samtage retransportitaj al sia hotelo. Se ili aliĝos al la kongresa ekskurso la 15-an de majo (dimanĉo), ili estos senpage transportitaj al la startejo de la ekskursa buso.

Se en via aliĝilo vi notos ke vi bezonas loĝadon en Zagrebo, Bjelovar au Đurđevac, la LKK rekte kontaktos kun vi por interkonsenti pri la detaloj.

TRANSPORTO (ZAGREBO-BJELOVAR-ZAGREBO) la 14-an de majo 2011

LKK organizos apartan buson por la kongresanoj el Zagrebo. En tiu buso povos kunvojaĝi ankaŭ alilokaj (alilandaj) esperantistoj kiuj tranoktos aŭ loĝos en Zagrebo. La busa transporto por la kongresanoj kiuj pagis la aliĝkotizon estas senpaga. Vi povas rezervi la lokon en la buso nur post kiam vi pagis la kotizon. Bonvolu rezervi baldaŭ, ĉar nombro de sidlokoj estas limigita.

La buso startos en Zagrebo en la loko poste sciigota, matene la 14-an de majo 2011 je la 7h00. La esperantistoj kiuj mendos loĝadon en Zagrebo pere de la LKK, enbusiĝos antaŭ sia hostelo.

INFORMADO:

Kongresanoj kiuj disponigos al ni sian retadreson, estos plurfoje dum la kongresaj preparoj informitaj pri gravaj detaloj. La aliaj povos informiĝi en la retpaĝaro de KEL aŭ en aparta retejo de la kongreso baldaŭ ekfunkcionta *http://www.ipernity.com/home/kroata.kongreso*.

KONGRESA PROGRAMO:

Ankoraŭ preparata. Se vi volas kontribui per iu programero, nepre urĝe informu pri tio la LKK-on por pritrakti la temon dum unu el siaj sekvaj kunsidoj.

KONGRESA EKSKURSO:

Ankoraŭ preparata. Nepre konsideru, ke la ekskurso okazos dimanĉe la 15-an de majo, kaj ke ĝi estas konvena por tiuj:

- kiuj propratransporte venos al Bjelovar
- kiuj loĝos en Bjelovar aŭ Đurđevac
- kiuj ne revenos al Zagrebo la 14-an de majo per organizita transporto

Kontakto kun la LKK:
lkk.bjelovar@gmail.com